Friedrich Schiller,

# Al la printempo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Saluton, vi belulo!
Ni bonvenigas vin.
Per via flor-korbeto
Vi tre ĝojigas nin.

Jen estas vi denove!
Karega estas vi!
Kaj ĝojas ni elkore
Ke vin revidas ni.

Ĉu pensas vi ankoraŭ
Pri mia amatin'?
Min amis la knabino,
Ankoraŭ amas min.

De vi por la knabino
petadis florojn mi.
Nun ree mi vin petas.
Kaj vi? - Ĉu donos vi?

Saluton, vi belulo!
Ni bonvenigas vin.
Per via flor-korbeto
Vi tre ĝojigas nin.

...

Friedrich Schiller,

# An den Frühling

Willkommen, schöner Jüngling!
Du Wonne der Natur!
Mit deinem Blumenkörbchen
Willkommen auf der Flur!

Ei! Ei! da bist ja wieder!
Und bist so lieb und schön!
Und freun wir uns so herzlich,
Entgegen dir zu gehn.

Denkst auch noch an mein Mädchen?
Ei, Lieber, denke doch!
Dort liebte mich das Mädchen,
Und 's Mädchen liebt mich noch!

Fürs Mädchen manches Blümchen
Erbat ich mir von dir -
Ich komm und bitte wieder,
Und du? - du gibst es mir?

Willkommen schöner Jüngling!
Du Wonne der Natur!
Mit deinem Blumenkörbchen
Willkommen auf der Flur!

...

*Traduko de la Germana poemo "An den Frühling" de* FRIEDRICH SCHILLER *(Frederiko Ŝilero, ∗1759 – †1805) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1983-07.20.*

*MR-081-2 / Arg-310-628 (2005-05-08 14:14:10)*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* FRIEDRICH SCHILLER *(Frederiko Ŝilero, ∗1759 – †1805).*

*Arg-310-627 (2005-05-08 14:15:56)*